

Romaoj

Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 8-an de junio 2021

*Gejljom, gejljom,
Gejljom, gejljom, lungone dromenca,
Maladjiljom baĥtale Romenca.
Aj, Romale, aj, ĉhavale.
Aj, Romale, aj, ĉhavale.
Aj, Romale, khatar tumen aven?
Le ĉerenca, baĥtale dromenca?
The man esas bari familija,
Murdarĝa la e kalji legija.
Aven manca sa lumjake Roma
Kaj phutjile le Romenge droma.
Ake vrjama – uŝtji Rom akana!
Amen ĥutjaha the miŝto keraha.
Aj, Romale, aj, ĉhavale.
Aj, Romale, aj, ĉhavale.*

**Mi iris, mi iris.
Tra longaj vojoj mi iris, mi iris.
Mi renkontiĝis kun feliĉaj romaoj.
Ho, romaoj, ho infanoj.
Ho, romaoj, ho, infanoj.
Ho, romaoj, de kie vi alvenas?
Kun tendoj, tra feliĉaj vojoj?
Ankaŭ mi havis grandan familion.
Nigra legio ĝin mortigis.
Romaoj de la tuta mondo, iru kun mi,
kie vojoj por romaoj estos malfermitaj.
Nun estas la tempo – homo, leviĝu!
Ni eksaltos kaj estos bone.
Ho, romaoj, ho infanoj.
Ho, romaoj, ho infanoj.**

Romaa himno

Lando, el kiu romaoj devenas

Jam en fino de la 18-a jarcento sciencistoj pruvis, ke romaoj devenas el Hindio. La unua sciencisto, kiu malkovris, ke romaa lingvo apartenas al hindiaj lingvoj, estis hungara lingvisto **István Vályi** (†1781). En Bohemio pri romaa lingvo okupiĝis du romkatolikaj pastroj. **Antonín Jaroslav Puchmajer** (1769 – 1820) estis romkatolika pastro, poeto, tradukisto kaj lingvisto. Pastro **Josef Pešina** (1824 – 1889) invitis la romaojn en sian pastradomon kaj parolis kun ili romalingve.

La plej versimila loko, el kiu la romaoj devenas, estas centra Hindio. Jam en la 3-a miljaro a. K. en nordokcidenta Hindio apud la rivero Hinduso ekestis unu el la plej malnovaj evoluintaj civilizoj apud la centroj Mohenĝo-daro kaj Harapato (*Harrapat*). La rivero estis plena da akvo el Himalajo, apud la rivero estis bona tero por agrokulturo. En kelkaj fortikigitaj urboj, konstruitaj laŭ ŝaktabulecaj planoj, estis tegelaj domoj, kiuj havis kanalan sistemon, banĉambrojn kaj eĉ necesejojn kun akvoŝpruco. Urbanoj sciis skribi kaj legi. Tiun kulturon kreis originaj loĝantoj de Hindio, al kiuj verŝajne apartenis antaŭloj de nuntempaj romaoj.

Ĉirkaŭ la jaro 1750 a. K. Hindion konkeris nomadaj triboj de Arjoj. La konkerantoj konservis sian pozicion de regantoj per strikta kasta sistemo. Kompreneble originaj loĝantoj, inter ili antaŭloj de nuntempaj romaoj, estis envicigitaj en la plej malaltan kaston. Ĉiuj kastanoj devas observi multe da reguloj. Membroj de kasto devis okupiĝi nur pri unu aŭ kelkaj metioj. Tial kelkaj kastanoj devis nomadi. Tio estis metia nomadado. Antaŭloj de la romaoj migris en diversajn partojn de Hindio, sed kaŭze de politikaj kondiĉoj kaj malsatego ili kontinuigis translokiĝi pli kaj pli okcidenten. El tiu tempo devenas suma nomo „romaoj“ (en Armenio „lomaŝoj“ kaj inter araboj „domaŝoj“).

Forlaso de Hindio

Foriro el Hindio estis malrapida. Ĝi okazis inter la 3-a kaj la 10-a jarcentoj p. K. en multaj ondoj. Romaoj iris trans Persio kaj Armenio al Nigra Maro. El Armenio unu fluo iris en nuntempa Ruslandon. Ĉefa fluo transiris markolojn Bosporo kaj Dardaneloj kaj trans Balkano kontinuas en Eŭropon, sed pli malmultenombra fluo iris el Malgranda Azio en Afrikon kaj setligis Proksiman Orienton kaj nordan Afrikon.

Alveno en Eŭropon

La unua skribita informo pri la romaoj en Eŭropo devenas el la 11-a jarcento (el la jaro 1068). En kroniko de iu greklanda monaĥo la romaoj estas nomataj *Atsigganos* (Netuŝeblaj). De tiuj nomoj devenas nomo de la romaoj en multe da eŭropaj lingvoj: esperantlingve: *ciganoj*, germane: *Zigeuner* [*cigojn*], hungare: *Cigányok* [*ciga:njok*], ĉeĥe: *Cikáni* [*cika:nji*], ruse: *цыганы* [*ciga:ni*]. La romaoj tiun nomon neniam akceptis. Ili ne devenis el Egiptio, sed ili longtempe loĝis en tiel nomata Malgranda Egiptio en ĉirkaŭaĵo de la urbo Méthoné en Peloponesa duoninsulo (Greklando). Pro tio aliaj nomoj de la romaoj devenas el la nomo Egiptio: angle: *gypsies* [*ĝipsi:s*], hispane: *gitanos* [*ĥitanos*]. La slovaka nomo *Farahun* kaj la hungara nomo *fárao népe* signifas „popolo de faraono“).

Por la romaoj pli signifaj ol komuna nomo estas nomoj de multaj subgrupoj.

La romaoj volis esti bone akceptitaj per kristanaj indiĝenoj. Tial ili pripensis kristanajn legendojn. Ili rakontis, ke ilia nomadumo estas puno por tio, ke ili ne volis ebligi tranokton al Jozefo, Maria kaj malgranda Jesuo, kiuj fuĝis en Egiption, aŭ ke romaaj forĝistoj preparis najlojn por krucumo de Jesuo Kristo. Sed ekzistas ankaŭ la legendo, ke ili nomadas por honesto de Sinjoro, ĉar ankaŭ Li devis voĵiri, kiam li fuĝis de Herodo. La romaoj ankaŭ rakontas, ke por krucumo de Jesuo Kristo origine estis preparitaj kvar najloj, sed la romaoj unu el la najloj ŝtelis, por ke nia Savanto ne tiel multe suferu.

En la 9-a jarcento en Pirenea Duoninsulo aperis romaoj el norda Afriko. Ĉefa fluo iris el bizanca imperio en Hungarion. En la 14-a jarcento ĉeesto de la romaoj estis raportitaj en Hungario, en la 15-a jarcento en Slovakio.

En la jaro 1417 certe romaoj estis en Bohemio (Prago) kaj Moravio (Znojmo). En la jaro 1418 la romaoj estis en bohemia urbo Cheb [*ĥeb*].

En la 15-a jarcento kelkaj romaoj el Bohemio alvenis en Francion, kie ili estis nomataj *les bohémiennes*, en Nederlandon kaj Danion. En la 16-a jarcento ili setligis Grandbriton kaj Norvegon.

Postsekvo

Eŭropaj indiĝenoj opiniis, ke la romaoj estas kristanoj, sed la romaoj ne tre kroĉiĝis al kristana ritaro kaj ne tre estimis eklezion. Krom tio ili miksis kristanismon kun animismo kaj budhismo. Ili ankaŭ okupiĝis pri nigra magio. Tio al la kristanoj ne estas permesita. Eŭropanoj opiniis, ke la romaoj estas mongolaj (tataraj) aŭ turkaj spionoj.

En mezepoko ĉiu lando en Eŭropo jam al iu apartenis. La romaoj ne posedis plugeblajn grundojn, sed ilia komunumo bezonis manĝi. Donacoj de indiĝenoj ne kapablis la problemon solvi, tial la romaoj ofte ŝtelis kaj ŝtelĉasis. Indiĝenoj (neromaoj) defendis siajn kampojn, rikoltaĵojn kaj posedaĵojn. Krom tio la romaoj aspektis alie, havis aliajn kutimojn kaj pensmanieron.

Postsekvo de la romaoj en Eŭropo komenciĝis en la jaro 1427, kiam pariza ĉefepiskopo anatemis la romaojn kaŭze de nerespektado de kristanaj reguloj.

En la jaro 1492 hispanoj forpelis arabojn el Hispanio. Poste ili forpelis ankaŭ hebreojn kaj la romaojn.

En la jaroj 1496 – 1498 en Germanio oni decidis, ke la romaoj devas esti forpelitaj kaj sekvitaj. Kiu ne meldis, ke li ie vidis iujn romaojn, tiu estis monpunita. Mortigo de la romao ne estis murdo kaj neniu pro ĝi estis punita.

En la jaro 1541 Prago suferis de brulego kaj praganoj sen iuj ajn atestoj akuzis la romaojn, ke ili la brulegon kaŭzis.

En la jaro 1545 bohemia reĝo **Ferdinando la 1-a Habsburga** aperigis mandaton pri ekziligado de la romaoj. En la jaro 1556 lia mandato estis plistikita. Romaaj viroj devis esti torturitaj kaj poste ekzekutitaj, sed virinoj kaj infanoj ne devas esti dronigitaj, kiel ĝis tiu tempo, sed uzataj al laboro.

Dum la tridekjara milito (1618 – 1648) estis ĥaoso, tial la romaoj povis reveni. Postsekvado de la romaoj kulminis dum regado de imperiestro **Leopoldo la 1-a Habsburga**. En la jaro 1697 li aperigis la mandaton, en kiu li proklamis, ke la romaoj estas eksterleĝuloj. Kaptitaj romaaj viroj estis ekzekutitaj. Kaptitaj virinoj kaj infanoj perdis unu orelon. Ili estis brulmarkitaj, batitaj kaj forpelitaj el la lando.

En la jaro 1721 **Karolo la 6-a Habsburga** la mandaton plimalbonigis tiel, ke ankaŭ kaptitaj romaaj virinoj povis esti ekzekutitaj. El tiu tempo ni scias 182 kontraŭromaajn juĝajn procesojn. Simile oni kondukis ankaŭ en aliaj eŭropaj landoj. Ne nur regantoj, sed ankaŭ kamparanoj estis kruelaj. Romaoj reakciis per malamo al la regantoj. Romaa komunumo kreis sendependan grupon, kiu kapablis transvivi inter malamikoj. En tiu tempo akriĝis malamo inter romaoj kaj neromaoj.

Tradicia vivo de romaa komunumo

Romaa komunumo estis gento, kiu konsistis el multe da familioj. Genta komunumo havis sian hierarĥion kaj direktis sin laŭ kutimaj etikaj normoj, neskribitaj leĝoj. Romaaj estroj prenis titolon reĝo aŭ militestro. El slava vorto *vojvoda* (militestro) devenas romaa vorto *vajda*.

Ĉiun romaan komunumon gvidis iu estro (nomata *vajda*, *mujalo*, *ĉibalo* aŭ *panjalo*). Li pri signifaj aferoj ne decidis sole, sed kune kun aliaj viroj. Maljunuloj estis estimataj. (Proverbo: *Ŝun le phuren, bo ĥale buter maro sar tu!* / Obeu la maljunulojn, ĉar ili formanĝis pli multe da pano ol vi!) Ankaŭ maljunulinoj estis estimataj pro ilia scio komuniki kun naturaj kaj universaj fortoj, scio de kuracherbon kaj nigra magio. Romaa esprimo *phuri daj* signifas laŭvorte „maljuna patrino“, sed ankaŭ „sorĉistino“.

Romaa grupo, kiu estis ĉirkaŭita per malamikeco de neromaoj, devis esti bonege organizita. Rapide kaj senbrue fuĝi kapablis nur bone funkcia kolektivo, kies ĉiu membro sciis kion fari, kiel konduti. Anarĥio tiun kolektivan defendon ne ebligis. Tial romaa komunumo observis striktan moralan kodon. Ne nur estroj, sed ĉiuj komunumanoj observis la kodon. Ĉiu komunumano estis voktita per ĉiuj aliaj komunumanoj. Romaoj ne sciis, kaj ĝis nun ili bone ne komprenas eŭropan „privatecon“.

Religio de la romaoj unuigas influojn de hindia kulturo kun modifita kristanismo kaj animismo. Hindia kulturo influis striktajn normojn por kuirado kaj manĝado. Simile al hebrea *koŝer* kaj araba *halal* manĝaĵoj ankaŭ la romaoj postulis rituale purajn manĝaĵojn kaj ne volis manĝi malpurajn manĝaĵojn (ekzemple la manĝaĵojn, kiuj estis kuiritaj en potoj, kiuj estis uzitaj por lavado de tolaĵo, aŭ la manĝaĵojn, kiuj iam estis en kontakto kun virina vestaĵo, precipe jupo). Virinoj zorgis pri infanoj, sed ankaŭ prizorgis manĝaĵon. (Proverbo: *Ajsi romnji kampel, savi maro anel.* / Bona edzino kapablas prizorgi la panon.) La virinoj devis esti fidelaj al siaj edzoj. Prostituo estis tre rara. (Nur dum socialismo la situacio ŝanĝiĝis.)

Rituale puraj romaoj, kiuj strikte observis higienon kaj manĝis nek hundan nek ĉevalan viandojn, nomiĝis *fuĝe Roma*. La romaoj, kiuj manĝis ĉevalaĵon, estis konsiderataj pli

malbonaj romaoj (*degeša, dubki, pšara*). Pejorativa nomo por manĝantoj de hundaĵo estis *rikonjara* (*rikono* – hundaĉo). Inter *fuĵe* kaj *degeša* estis barieroj.

En romaa komunumo la romaoj ne ŝtelis. Propraĵo de ĉiuj komunumanoj estis komuna. La frazo „pruntedonu al mi“ estas tradukita: *de man* „donu al mi“. La romaoj ne estimis aĵojn kaj ne kutimis ilin ripari. Se ili nomadis, ili ne povis transporti multe da aĵoj. Esceptoj estis gentaj juveloj kaj muzikaj instrumentoj. Sed ankaŭ ili povis iam esti ŝanĝitaj por manĝaĵo.

La komunumo havis ankaŭ socialan funkcion. La romaoj estis solidaraj kun iuj ajn handicapuloj, precipe kun malsanuloj, orfoj, vagantoj kaj senhejmuloj. (Proverboj: *Rom ĉores pritulinel, mijel Rom mijel gaĝo*. – Romao zorgas pri ĉiu ajn, same pri romao, same pri neromao. – *Rom preĝivel but pharipen, vašoda les hin jilo sakoneha*. – Romao travivis multe da malfacilaĵoj, tial li ĉiun kompatas.)

Laŭ hinduisma principo la romaoj protektis ĉion vivantan. (Proverboj: *Sako ĝido vodj'i kamel te ĝivel: ĝiv a mukh te ĝivel*. / Ĉiu vivanto volas vivi: vivu kaj lasu vivi. – *Abo avreske ĉhavo, abo miro, te ĥal kamen so duj*. / Infano de aliulo, mia infano, ili ambaŭ volas manĝi.)

La romao, kiu ne observis neskribitajn romaajn leĝojn, estis juĝita. Pli aĝaj viroj lin juĝis kaj punis. La plej grava puno estis elkomunumado. Tio estis vere puno de morto, ĉar unuopulo, kiu devis forlasi romaan komunumon, neniam estis akceptita per malamikoj.

Ŝtelado kaj alia parazitismo kontraŭ neromaoj estis konsiderataj bono por romaa komunumo. Ekde mezepoko la romaoj ekkutimis vivi je kosto de neromaoj.

Sed la kutimoj estis diversaj en diversaj romaaj grupoj. (Proverbo: *Keci vatri, ajci sikhlij'ipen*. / Kiom da setlejoj, tiom da kutimoj.) Diferencoj inter grupoj pligrandigis, kiam kelkaj romaoj ĉesis nomadi kaj, precipe en Hungario, kie romaoj jam ekde la 16-a jarcento setliĝis.

Romaa lingvo

La romaoj neniam uzis skribon, sed kreis propranaturan kulturon. Unu generacio al la alia perbuŝe transdonis ĉiujn sciaĵojn. Romaa lingvo estas novhindia lingvo, kies bazo estas sanskrito. Ĝi atestas pri hindia origino de romaoj. Multe da dialektoj evoluis, sed romaoj el diversaj grupoj kapablas interkompreniĝi.

Romaaj infanoj ne estis edukitaj laŭplane, sed ili lernis de ĉiutaga vivo de tuta grupo. Ili baldaŭ devis zorgi pri manĝaĵo, labori kaj helpi al adoltuloj. Tre signifaj estis romaaj fabeloj (*paramisa*). Herooj de la fabeloj kondutis aŭ honeste (*patjivales*) aŭ al honto (*pre laĝ*). Romaaj fabeloj temas precipe pri fuĝo de malbono kaj defendo de vivo danke al propra ruzeco. Ŝercaj rakontoj (*pherasa*) estis anekdotoj. Docentino **Milena Hübschmannová** (1933 – 2005) eldonis kolekton de romaaj proverboj (*godj'aver lava*).

Muziko kaj kantoj akompanas la romaajn dum tuta vivo. (Proverboj: *Laĉhi gilj'i, so pes rovel opre*. / Bona estas la kanto, je kiu homo povas satplori. – *Andre gilj'i, ŝaj pes phenel savoro*. / Per la kanto oni povas diri ĉion.)

Romaaj muzikistoj ludis alian repertuaron por neromaoj kaj alian repertuaron por si mem. (Proverbo: *Gaĝeske bašavav andro kan, Romeske andro jilo*. / Al neromao mi ludas por lia ĝojo, sed al romao mi ludas por lia koro.)

Romaa lingvo estas gepatra lingvo de la romaoj. Dum socialismo ŝtataj oficistoj konsideris romaan lingvon jargono kaj konvinkis romaajn gepatrojn, por ke ne instruu iliajn infanojn paroli romaan. Tiel ili faris grandajn domaĝojn, ĉar la gepatroj, kiuj ne sciis bone ĉeĥan lingvon, kapablis instrui siajn infanojn nek bone ĉeĥan lingvon, nek bone romaan lingvon. La infanoj, kies unua lingvo estis romaa lingvo, poste pli bone ellernis la ĉeĥan lingvon. Danke al laboro de edukitaj romaoj kaj romistoj jam ekzistas origina romaa literaturo.

Kolokva ĉeĥa lingvo uzas origine romaaajn vortojn *love* (mono) kaj *čokl* (*ĝukel* – hundo). En dialekto de Ostrava estas la vortoj *dyolino* ([dilino] – stultulo) kaj *dylina* ([dilina] – stultulino). *Čorel* romae signifas ŝteli, tial *čorovat'* [ĉorovatj] havas la saman signifon en dialekto de Ostrava kaj *čórovat* [ĉo:rovat] en dialekto de Brno. En Brno oni scias la vorton *chálka* [ĥa:lka] (manĝaĵo), ĉar romaa *hal* signifas „manĝi“, kaj *kér* [ke:r] (loĝejo), kiu devenas el romaa vorto *kher* (domo, loĝejo).

Tradiciaj romaaaj metioj kaj okupoj

Same kiel en Hindio, ankaŭ ĉe la romaoj ĉiu grupo okupiĝis nur pri unu metio. Tial la romaoj bezonis nomadi. Tio estis forĝistoj, kaldronistoj, ŝlifistoj, dratistoj, fabrikantoj de ligna vazaro kaj trogoj, korboplektistoj.

Aliaj romaaaj grupoj vagis amuzante homojn per akrobataĵoj, prezentado de drezuritaj bestoj (precipe ursoj kaj simioj), pupteatro, teatro kun muziko kaj dancoj. La plej malriĉaj romaoj kolektis kaj vendis uzitan varon, kolektis malnovajn ŝtofojn, ostojn, plumojn. Vagantaj romaoj ofte okupiĝis pri magio. Ili ofte estis ĉevalmarĉandistoj. Aĉetado kaj vendado de ĉevaloj havis la avantaĝon, ke la ĉevalmarĉandistoj gajnis monon, ne nur naturajn produktojn. Setliĝitaj romaoj ankaŭ bredis kaj vendis porkojn.

Romaaaj grupoj ŝanĝis laborspecojn laŭ jaraj sezonoj. Ekzemple vintre la romaoj plektis korbojn, somere ili laboris kiel sezonaj helpantoj ĉe bienmastroj aŭ masonistoj, intertempe ili okupiĝis pri fabrikado de malgrandaj forĝistaj produktoj kaj krom tio ili ludis (geedziĝoj, sepultadoj).

Argilo estis facile atingebla natura materialo, tial kelkaj romaoj estis potfaristoj, produktantoj de brikoj. Romainoj izolis fornojn per la argilo. Ili ankaŭ fabrikis brosojn kaj penikegojn.

La romaoj, kiuj helpis al indiĝenoj, estis pli bone akceptitaj kaj precipe pli riĉaj ol nomadoj.

Muzikistoj estis bone akceptataj. Ili plej baldaŭ setlis kaj estis estimataj ankaŭ inter aliaj romaoj. (Proverbo: *Lavutaris avre ĥarakterihā ĝivel sar degeŝis*. / Muzikisto vivas laŭ aliaj principoj ol krudulo.)

Setlado en daŭraj setlejoj

Maria Terezia (1717 – 1780; regado 1740 – 1789) postsekvis la romaojn ĝis la jaro 1761. Ŝi ekhavis la opinion, ke ekzekutoj kaj pelado de romaoj el unu lando en la alia la problemon ne solvas. Tial ŝi volis transformi la romaojn al hungaraj kamparanoj. Anstataŭ la vorto „ciganoj“ estis uzataj la vortoj „novaj hungaroj“ (*új magyarok*). Ili ne devis paroli romaaaj kaj vestiĝi romamaniere. Infanoj inter la sepa kaj dekdua jaroj estis adoptitaj en neromaaaj familioj. La imperiestrino atentigis pri neceso de regula lerneja instruado, partoprenado en diservoj kaj plibonigo de higienaj kondiĉoj.

Imperiestro **Jozefo la 2-a Habsburga** (1741 – 1790; regado 1765 – 1790), filo de Maria Terezia, kontinuigis la programon de setligado de la romaoj. Bedaŭrinde spite de pozitivaj efikoj la reformoj daŭris nelonge kaj ne estis faritaj same intense en ĉiuj partoj de monarĥio. La plej efika estis hungarigado de romaoj en Hungario.

Eĉ dum la regado de Jozefo la 2-a Habsburga la romaoj estis sekvitaj. En la jaro 1782 en nuntempa Slovakio oni akuzis 170 romaojn pri kanibalismo, torturis ilin kaj 40 el ili ekzekutis. La personoj, pri kiuj oni pensis, ke ili fariĝis viktimoj de „kanibalaj“ romaoj, poste estis trovitaj vivantaj kaj sanaj.

Setlado en Bohemio kaj Moravio

En Moravio estis pli bonaj kondiĉoj por setlado de romaoj ol en Bohemio. Antaŭ la jaro 1698 grafo Kounic setligis en sia bieno apud la urbo **Uherský Brod** familion de romaa

forĝisto **István Daniel** el Hungario (Győr). La forĝisto laboris por la grafo, lia familio povis loĝi en grafa bieno, sed ne devis paroli romaan kaj romamaniere vestiĝi. Suda kaj sudorienta Moravio fariĝis bona loko por setlado de romaaj familioj.

Kiam Jozefo la 2-a Habsburga malfondis multe da monaĥeoj, en 13 moraviaj setlejoj romaoj ricevis konfiskitan monaĥejan teron por setlado, sed nur en **Bohusoudov** kaj **Oslavany** estis fonditaj grandaj romaaj setlejoj.

Ekde komenco de la 19-a jarcento romaoj volis setliĝi en Moravio, sed indiĝenoj ne volis romaajn najbarojn. Tial la romaoj povis setliĝi nur en randoj de vilaĝoj kaj urboj. La romaoj estis oficiale senhejmuloj. Ili ne povis lerni en lernejoj, sed ankaŭ ili pri lerneja edukado ne interesiĝis. Analfabetaj romaoj, kiuj malbone parolis ĉeĥan, ne povis eniri en indiĝenan socion, tial iliaj setlejoj fariĝis getoj.

Setlejoj de moraviaj romaoj havis 30 – 100 loĝantoj. Oftaj familiaj nomoj estis: Daniel, Holomek, Malík, Herák, Kýr kaj István.

En Bohemio nomadis kaj setliĝis la romaoj kun familiaj nomoj Růžička, Vrba kaj Serynek. Se romaoj sukcese penetris en vilaĝojn kaj urbojn, iliaj infanoj devis lerni en lernejoj.

Romaoj volis havi bonajn rilatojn al indiĝenoj, kiuj estis iliaj klientoj aŭ labordonantoj. Tial ili jam ne plu volis parazitati. Antaŭ la 2-a mondmilito jam kelkaj romaoj en Ĉeĥoslovakio akiris mezlernejan aŭ eĉ altlernejan edukadon.

Sed samtempe en Moravio estis duonnomadaj romaoj el rumana princo Valaĥio (valaĥiaj romaoj), kies tradicio estis nomada vivstilo. En getoj romaoj suferis de malsato, malbona higieno.

Genocido

Ĉeĥoslovaka Respubliko, kiu ekestis la 28-an de oktobro 1918, estis demokrata ŝtato, sed romaoj tie estis diskriminitaj. Laŭ la leĝo numero 117/27 Kol. el la 15-an de julio 1927, pri vagantaj romaoj, ekzistis diferenco inter nomadaj romaoj, kiuj ekde la aĝo 14 jaroj devis havi cikanajn identikilojn, kaj setlitaj romaoj, kiuj povis havi civitanajn identikilojn.

Gvidantoj de nomadaj grupoj devis havi nomadajn dokumentojn, en kiuj vilaĝestroj kaj urbestroj atestis permeson de romaa restado. Nomadaj romaoj ne devis viziti banlokojn, grandajn urbojn kaj ripozejojn. Tio estis anoncita sur grandaj afiŝtabuloj ĉe ŝoseoj.

En Germanio romaoj estis endanĝerigitaj jam ekde la jaro 1933, kiam „ciganoj“ estis oficiale konsiderataj „fiula loĝantaro“. Ekde la jaro 1937 en Esplorinstituto por Rasa Higieno kaj Biologa Esplorado de Loĝantaro (*Rassenhygienische und Bevölkerungsbiologische Forschungsstelle*) laboris kvazaŭsciencistoj **Robert Ritter** (1901 – 1951) kaj **Eva Justin** (1909 – 1966), kiuj volis subteni naziajn rasismajn teoriojn. Justin parolis romaan, tial ŝi akiris konfidon de romaoj kaj sintoj (germanaj romaoj). Ekde la jaro 1940 germanaj kaj aŭstriaĵ romaoj estis malliberigitaj en ciganaj koncentrejoj en Lakenbach (Aŭstrio), Kalinigrad (Pruslando) k. a.

Kiam en Germanio, Aŭstrio kaj Sudetoj nazioj romaojn persekutis, romaoj alvenis en landinternon, kie ili havis multajn konfliktojn kun indiĝenoj. Precipe la plej potenca politika partio (Partio de Bohemia Kamparo, agrara partio, *Strana českého venkova*) kondukis malame al romaoj.

Jam aŭtune 1939 protektorata Ministerio de Internaj Aferoj devigis nomadojn setligi. Tiuj, kiuj ne obeis, estis somere 1940 malliberigitaj en disciplinaj laboraj barakaroj en Lety apud Písek kaj Hodonín apud Kunštát. Vilaĝestroj kaj urbestroj havis taskojn setligi romaojn, sed ofte ili anstataŭ tio sendis romaojn en la barakarojn.

La 9-an de marto 1939 protektorata registaro eldonis dekreton pri preventa venko de krimeco. Tio signifis, ke krimuloj kaj kontraŭsociuloj povis esti malliberigitaj. Ili devige

laboris en Prago, Pardubice, Brno kaj aliaj barakaroj. Al la kontraŭsociuloj laŭ ti dekreto apartenis laŭvorte „ciganoj kaj ciganmaniere vivantaj personoj“

La 10-an de julio 1942 komandanto de protektorata polico eldonis edikton por „venko de cigana malordo“. La edikto ordonis krei liston de ĉiuj romaoj kaj iliaj hibriduloj. Ĉiuj romaoj jam devis havi nur ciganan identikilon. Tiel ili estis markitaj kaj izolitaj de aliaj civitanoj. Malmulto de romaoj estis sendita en ciganaj barakaroj en Lety apud Písek kaj Hodonín apud Kunštát. En malbonaj vivkondiĉoj tie suferis pli ol 3 000 da romaoj. La plej malbona malsano estis makula tifo, kies kaŭzanto estas la rikrecio *Riketsia prowazeki*. La rikrecio transmisias la laŭso *Pediculus humanus corporis*. Sed la malliberuloj suferis ankaŭ de skabio, intestaj malsanoj, tuberkulozo kaj aliaj malsanoj. Tragedioj okazis, kiam al gravedaj romainoj naskiĝis infanoj, kiuj en teruraj kondiĉoj de la barakaroj ne havis ŝancon transvivi. Pli granda parto de romaoj restis relative en paco, sed en decembro 1942 **Heinrich Himmler** (1900 – 1945) ordonis deporti „ciganojn kaj iliajn hibridulojn“ en koncentrejon Aŭŝvico (*Auschwitz II – Birkenau*). Tie romaoj rapide mortis (ĉirkaŭ 5 500 da viktimoj). **Joseph Mengele** (1911 – 1979) uzis kelkajn romaojn por siaj kvazaŭsciencaj eksperimentoj. Kiam en la jaro 1944 fronto proksimiĝis, romaoj, kiuj kapablis labori estis transportitaj en germanan enlandon. Maljunuloj kaj patrinoj kun infanoj (pli ol 3 000 personoj) estis nokte ekde la 2-an ĝis la 3-an aŭgusto 1944 mortigitaj en gazkameroj. El koncentrejoj revenis nur 538 romaoj. Ankaŭ multe da sintoj estis mortigitaj. En la koncentrejo Aŭŝvico mortis pli ol 20 000 da romaoj el tuta la mondo. Dum la dua mondmilito mortis ĉirkaŭ 500 000 da romaoj.

El tiel nomata Slovaka Ŝtato (1939 – 1945) romaoj ne estis malliberigitaj en koncentrejoj, sed ili suferis de ĉikano. Ili povis viziti urbojn nur en strikte determinita tempo. Setlejoj devis esti konstruitaj nur minimume 2 km de ŝoseoj. Post la jaro 1941 viroj devis labori en laboraj barakaroj en Hanušovice nad Topľou, Dubnica nad Váhom k. a. Kiam en septembro 1944 Slovakio estis okupaciita per germana armeo, multe da romaaj setlejoj estis elbruligitaj kaj multe da romaoj estis ekzekutitaj kaŭze de ilia supozata aŭ vera subteno de slovakaj gerilanoj.

El suda kaj sudorienta parto de Slovakio, kiu dum la mondmilito apartenis al Hungario, oni romanojn deportis en la koncentrejon Dachau.

Sed la romaoj ne volis esti nur viktimoj de nazia teroro. Se ili havis eblecon, ili kontraŭ nazioj brave batalis. La plej konataj romaa gerilanoj estis **Josef Serinek** (1900 – 1974), kiu fuĝis el barakaro en Lety u Písku kaj en Bohemia-Moravia Montetaro fariĝis komandanto de gerilana taĉmento Ĉapajev, kaj **Antonín Murka** (1923 – 1989) kiu fuĝis el barakaro en Hodonín u Kunštátu kaj en Valaĥio (Moravio) batalis en gerilana taĉmento Jan Žižka el Trocnov.

Socialisma reĝimo

Post la dua mondmilito en Bohemio kaj Moravio estis malmulte da romaoj, ĉar el koncentrejoj nur 538 romaoj revenis. Tial alvenis la romaoj el Slovakio, kiuj havis aliajn kutimojn, vestaĵon kaj vivstilon ol romaoj, kiuj ĉi tie vivis antaŭ la milito. Ili devenis el romaaj setlejoj en Slovakio kaj serĉis ne nur laboron, sed ankaŭ bonajn loĝlokojn. Tial la romaoj setligis precipe industriajn urbojn (Ostrava, Kladno, Prago) kaj eksajn Sudetojn.

Socialiasma konstitucio donis al la romaoj rajton esti validaj membroj de socialisma socio. Sed kia estis realaĵo? Ĝis la jaro 1950 estis valida la leĝo pri vagantaj ciganoj. En la jaro 1952 estis eldonita la direktivo Ordigo de Situacio de Personoj kun Cigana Deveno. En oktobro 1958 estis aprobita la leĝo numero 74 pri daŭra setligo de nomadoj. **En la jaro 1959 ĉiuj romaoj en Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko devis formunti radojn de siaj nomadaj ĉaroj** kaj resti tie, kie ili en tiu momento ĉeestis. Tiam tero jam apartenis al unuecaj agro-kooperativoj. La romaoj povis labori nur en la agro-kooperativoj aŭ en fabrikoj.

Socialisma reĝimo volis neniigi kutimojn kaj lingvon de romaoj. Tiel ekestis morala vakuo. La romaoj forlasis siajn tradiciojn. Gepatroj ĉesis instrui siajn infanojn paroli romaan lingvon, sed ili mem ofte ne sciis paroli bone ĉeĥan. Tial iliaj infanoj parolis nek bonan romaan nek bonan ĉeĥan.

La romaoj neromaan kulturon ne komprenis. Tial ili neromaojn nur imitis. Ili gajnis monon, riĉiĝis, plibonigis siajn hejmojn, bele vestiĝis „kiel la neromaoj“, sed morale ili restis sur malalta nivelo. Precipe en industriaj centroj romaoj rapide forlasis tradiciajn romaajn valorojn. De neromaoj ili ellernis malbonan konduton. (Proverbo: *Te gaĝo sikhli'lahas le Romestar leskero laĉho, Rom na sikhli'lahas gaĝestar leskero nalaĉho.* / Se neromao estus kompleza lerni de romao tion, kio en romao estas bona, romao ne lernus tiel kompleze de neromao tion, kio en neromao estas malbona.)

La romaoj, kiuj ĝis tiu tempo estis memsufiĉaj, ekuzas novajn proponojn de socialisma socio. Ili ekmetis siajn infanojn en infanhejmojn. Romaaj virinoj ekvivis de prostitucio. Multaj romaoj fariĝis krimuloj.

Ekde la jaro 1965 ŝtato volas neniigi romaajn setlejojn kaj disigi romaojn en tutan teritorion. Tio estis nesukcesa, ĉar en urboj ekestis novaj izolitaj romaaj setlejoj (Chánov apud Most, Luník en Košice, Černé město apud Rimavská Sobota k. a.).

Romaaj gentaj komunumoj, kiuj kapablis garantii moralan nivelon, estis neniigitaj. Romaoj jam ne kapablis kontroli observadon de romaaj tradicioj. Krom tio socialismaj oficistoj ne respektis diferencojn inter diversaj romaaj grupoj. Tial en unu domo, eĉ en unu koridoro povis ekvivi ekzemple romaoj *fuĵe* kun romaoj *degeŝa*. Tio estis kaŭzoj de multaj konfliktoj inter romaoj. Krom tio romaoj ne sciis ekzemple uzadon de necesejoj kun akvoŝpruco, gasforneloj k. a. En tiu tempo okazis la plej granda morala detruado de romaoj. Ili estis konsideritaj ne etna grupo, kiu havas siajn rajtojn, ses nur sociala-patologa grupo.

Pozitivaĵoj estis likvidado de analfabetismo kaj akceso al kuracista zorgo. En la 60-aj jaroj de la 20-a jarcento enkadre de Nacia Fronto romaoj fondis **Asocion de Ciganoj-Romaoj** (*Svaz Cikánů-Romů*), kiu funkciis en la jaroj 1969 – 1973. Celo de la Asocio estis egalrajta kaj senkonflikta kunvivo de neromaoj kaj la romaoj, kiu garantius evoluon de romaa etno en socialisma socio. Sed Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio, kiu dum soveta okupado eniris en stadion de „normalizado“, kun klopodo de la romaoj ne konsentis. En la jaro 1973 ĉeĥoslovakaj komunistoj la Asocion de Ciganoj-Romaoj neniigis.

En la 70-aj jaroj komunistoj donis al la romaoj materialajn avantaĝojn (loĝejojn, socialaj financajn kontribuojn), sed tiu konduto plej multe romaojn paralizis. Antaŭe sendependaj romaoj ne plu klopodis ion akiri per sia laboro, ili nur atendis tion, kion la ŝtato al ili donas.

Antaŭ la jaro 1989 romaoj ne estis konsideritaj propranatura etna grupo, nur sociale retardita grupo, kiun oni devas reeduki laŭ ĉeĥa modelo.

La plej insidema estis sterilizado de romaaj virinoj, pri kiu la virinoj ofte ne sciis kaj kun kiu ili neniam jesus. Post cezara operacio sterilizado okazis per stringo de ovarioj. La virinoj subskribis la jeson kun sterilizado senprokraste post la operacio, kiam ili ne kapablis koncentriĝi pri teksto de dokumento, kiun ili subskribis. Dokumentoj kaj subskriboj ofte estis falsitaj. Minimume en la jaroj 1966 – 2010 en Ĉeĥa Respubliko okazis la sterilizado de miloj da romaaj virinoj. En la jaro 1977 pri la sterilizado de romainoj atentigis Ĉarto 77 (Pozicio de Ciganoj-Romaoj en Ĉeĥa Respubliko, la dokumento numero 23). En la 80-aj jaroj pri tiu problemo okupiĝis **Ruben Pellar** (*1949) kaj **Zbyněk Andrš** (*1955). Romaa perantino **Elena Gorolová** (*1969), kiu estis steriligita en la jaro 1990, post nasko de sia la dua filo, batalas por kompenzado de tiuj damaĝoj.

Nuntempo

Same kiel en fino de la 60-aj jaroj ankaŭ en fin de la 80-aj jaroj la romaoj kredis, ke libera socio al ili donos novajn ŝancojn. Ekestis kelkaj romaaj politikaj partioj. En la unua balotado en la jaro 1990 oni elektis 10 romaajn deputistojn de Federala Asembleo, Ĉeĥa Nacia Konsilio kaj Slovaka Nacia Konsilio. Krom tio estis fonditaj diversaj kulturaj organizoj: **Kultura Asocio de Civitanoj kun Romaa Nacieco** (*Kulturní svaz občanů romské národnosti*), **Asocio de Romaaj Aŭtoroj kaj Verkistoj** (*Svaz romských autorů a spisovatelů*), **Romaa Kleriga Centro – Romaa Kristana Asocio** (*Matice romská – romské křesťanské sdružení*), **Bonfara Fondaĵo Ĝeno por Renovigo kaj Evoluo de Tradiciaj Romaaj Valoroj** (*Nadace Dženo na obnovu a rozvoj tradičních romských hodnot*), **Asocio de Romaoj en Moravio** (*Společenství Romů na Moravě*). En Brno estis fondita **Centro de Romaoj por Orienta kaj Centra Eŭropo** (*Centrum Romů pro východní a střední Evropu*). Oni eldonis romaajn ĵurnalojn: monatan revuon *Laĉho lav* (Bona Vorto), poste *Amaro lav* (Nia Vorto) kaj fine *Amaro gendalos* (Nia Spegulo). En Brno oni eldonas dusemajnan ĵurnalon *Romano kurko* (Romaa Semajno). En Ĉeĥa Radio romaaj perantoj akiris establaron de redakcio de romaa radiodisaŭdigo. Populara estas la relacio *O Roma vakeren* (Romaoj Parolas). En Ĉeĥa Televizio estas romaa relacio *Romale*.

En la jaro 1991 en Brno estis fondita *Muzeum romské kultury* (Muzeo de Romaa Kulturo), kiun gvidas dr-ino **Jana Horváthová**. En la jaro 1992 en Brno la Muzeo aranĝis grandan ekspozicion *Romové v Československu* (Romaoj en Ĉeĥoslovakio). Ekde la jaro 1997 estas aranĝita migra ekspozicio de romaaj neprofesiaj artistoj *E luma romane jakhenca* (La Mondo Rigardita per Romaaj Okuloj).

Adreso de la Muzeo de Romaa kulturo: Strato Bratislavská 246/67, CZ – 602 00 Brno-Zábrdovice, Ĉeĥa Respubliko. Retadreso de la Muzeo: sekretariat@rommuz.cz.

Grandan signifon havas la festivalo Romaa Kanto (antaŭe *Romfest*), en kiu partoprenas romaoj de ĉiuj romaaj grupoj, subgrupoj kaj gentoj. Bedaŭrinde romaaj agadoj okazas sen ĉeesto de neromaoj.

Ekde la jaro 1994 oni eldonas *Časopis romistických studií Romano džaniben* (Ĵurnalo de Romistaj Studaĵoj Romano Ĝaniben).

En Hindologia Instituto de Karola Universitato en Prago estis fondita la Katedro de Romaa Lingvo kaj Scienco pri Romaoj, kiun gvidis docentino **Milena Hübschmannová** (1933 – 2005). Ankaŭ en altlernejoj en Ústí nad Labem kaj Olomouc oni povas trovi informojn pri Romaoj, romaa lingvo kaj kulturo.

Post la jaro 1989, kiam la ŝtato ekfunkciis je principo de merkata ekonomio, nekvalifikitaj romaoj ofte perdis laboron. Senlaboreco de romaoj oscilas laŭ lokaj kondiĉoj inter 50 – 95 %. La senlaboreco estas kaŭzata per malalta nivelo de edukado de la romaoj. Romaaj infanoj alvenas en la unuaj klasoj malbone preparitaj. Ili ofte ne scias bone paroli ĉeĥan. Hejme ili ne havas bonajn kondiĉojn por farado de hejmlaboroj kaj lernado. Romaaj gepatroj ofte kun instruistoj ne kunlaboras. Tial romaaj infanoj ofte estas senditaj en specialajn lernejojn (= lernejoj por la infanoj, kiuj ne kapablas lerni en normalaj lernejoj) kaj poste ili ne povas kontinui studadon en mezlernejoj.

Pli ol unu triono da civitanoj de Ĉeĥa Respubliko ne ŝatas romaojn. Ne temas nur pri neonaziaj razkapuloj, sed ankaŭ pri ksenofobio kaj rasismo inter popolo.

Strukturo de romaa komunumo en Ĉeĥa Respubliko

La romaoj estas la plej multenombra etna malplimulto de Ĉeĥa Respubliko (laŭ proksimuma takso de Registara Ofico **240 300 civitanoj**).

La plej abundaj estas slovakaĵaj romaoj (*servika Roma*): 80 %. Ili dividas en okcidenta kaj orienta grupoj.

La dua grupo estas valaĥiaj omaoj (*vlaĥike Roma*): 10 %.

La tria grupo (10 %) estas hungaraj romaoj (*ungrike Roma*) kaj restaĵoj de ĉeĥaj romaoj kaj germanaj sintoj.

Romaaj personecoj

Muziko

Jožka Kubík (1907 – 1978), moravi-slovaka muzikisto; **Jožka Giňa** (1928 – 1997), violisto; **Antonín Gondolán** (*1942), **Iva Bittová** (*1958), **Lucie Bílá** (*1966), propranome Hana Zaňáková

Filmo

Charlie Chaplin (1889 – 1977), **Yul Brynner** (1915 – 1985), propranome Taidje Kahn, **Ava Gardner** (1922 – 1990)

Historio

D-rino **Jana Horváthová-Holomková** (*1967), direktorino de Muzeo de Romaa Kulturo en Brno

Literaturo

Elena Lacková (1921 – 2003) – dramo *Brulanta Cigana Tendaro* (*Horiaci cigánsky tábor*), libro *Mi Naskiĝis sub Feliĉa Stelo*

Medicino

D-ro **Vladimír Horváth** (*1970), ĥirurgo

Helpo al romaoj en Ostrava

Kumar Vishwanathan (*1963), pedagogo, sociala laboristo

Religio

La unua sanktulo: **Ceferino Jiménez Malla** (1863 – 1936), kromnomata El Pelé, kiu dum la civitana milito en Hispanio savis pastron. Patronino de romaoj estas sankta Kali Sara.

Hinda sociala laboristo Kumar Vishwanathan, kiu en la jaro 1997 en Silezia Ostrava helpis al romaoj, kiuj suferis de inundo, vidas tion, kion ne vidas aŭ ne volas vidi multaj homoj en Ĉeĥa Respubliko: **romaa socio estas juna kaj kreskanta komunumo, kiu kapablas Ĉeĥan Respublikon pliriĉigi.**

Rekomendita literaturo

ADAMIČKOVÁ, N. & KÖNIGOVÁ, M. 2014: Evropský soud tlačí vládu k odškodnění za nedobrovolné sterilizace romských žen. <https://www.novinky.cz/domaci/clanek/evropsky-soud-tlaci-vladu...> 13.3.2014.

ČTK 2009: Vláda: Litujeme nezákonných sterilizací romských žen. <https://www.lidovky.cz/domov/vlada-litujeme...> 23.11.2009.

ČTK 2020: Učte ve školách i romské dějiny, doporučuje Rada Evropy.. <http://www.novinky.cz/veda-skoly/clanek/ucte-ve-skolaci...> 2.7.2020.

ČTK 2021: Film romské filmařky Very Lackové o odboji Romů proti nacistům bude mít premiéru v Německu. <https://www.romea.cz/cz/zpravodajstvi/zahranicni/film-romske-filmarky...> 16.4.2021.


ČTK 2021: Romové by se mohli dočkat odškodnění za majetek, který jim zabavili nacisté. <http://www.seznamzpravy.cz/clanek/romove-by-se-mohli...> 13.5.2021.

ČTK 2021: Česko by mohlo mít do konce příštího roku zmocněnce vlády pro Romy. <https://www.novinky.cz/domaci/clanek/cesko-by-mohlo...> 5.6.2021.

ERDŐS, K. 2009: Klasifikace Cikánů v Maďarsku. Paĝoj 154-168. En: JAKOUBEK, M. & BUDILOVÁ, L. (Geeditoroj): *Cikánské skupiny a jejich sociální organizace*. 1-a eld., Brno, Centrum pro studium demokracie a kultury, 359 paĝoj.

- EVROPSKÉ CENTRUM PRO PRÁVA ROMŮ, 2016: Nucené a kruté. Zpráva Evropského centra Romů. www.errc.orr/upload/upload-en/file/nucene-a-krute...28-november-2016.pdf, 81 pağoj.
- GUY, W. 2009: Význam rodinných vazeb pro migraci českých a slovenských Romů. Pağoj 267-285. En: JAKOUBEK, M. & BUDILOVÁ, L. (Geeditoroj): Cikánské skupiny a jejich sociální organizace. 1-a eld., Brno, Centrum pro studium demokracie a kultury, 359 pağoj.
- HORVÁTHOVÁ, J. 1998: Základní informace o dějinách a kultuře Romů. 1-a eld., Prago, Ministerstvo školství, mládeže a tělovýchovy, 49 pağoj.
- HÜBSCHMANNOVÁ, M. 1976: Cikánština. Metodický materiál pro učitele cikánských dětí. 1-a eld., Ústí nad Labem, Krajský pedagogický ústav, 80 pağoj.
- JANEČEK, P. 2005: Ostravsko-český slovník zejména pro Čech obyvatele, nejvíce pak pro města hlavního obyvatele, ku pochopení lepšímu dělného lidu prostého. 1-a eld., Ostrava, Repronis, 80 pağoj.
- JELÍNEK ČIČA, P. 1996: Štatl. 5-a eld., Brno, FT Records, 76 pağoj.
- JEŘÁBKOVÁ, D. 2021: Tři sta tisíc korun pro protiprávně sterilizované ženy, schválili poslanci. <https://www.novinky.cz/domaci/clanek/tri-sta-tisic-korun...4.6.2021>.
- KENRICK, D. 2003: Cikáni na cestě z Indie do Evropy. 1-a eld., Olomouc, Univerzita Palackého – Centre de recherches tsiganes, 79 pağoj.
- KOMÁREK, M. 2021: Nahlížení minulosti: „Hodně Cigánů se mělo za komunismu líp.“ <https://www.seznamzpravy.cz/clanek/nahlizeni-minulosti...12.5.2021>.
- KORITÁKOVÁ, D. 2021: Mrtvá štěnata jako hračky dětí, dospívající fetují ředidlo. <https://cnn.prima.cz/realita-romske-osady... 1.5.2021>.
- LACKOVÁ, E. 2002: Narodila jsem se pod šťastnou hvězdou. Uřílom tel bachtaří čercheň. 2-a eld., Prago, Triáda, 280 pağoj.
- LESKOVÁ, I. & RIEBAUEROVÁ, M. 2014: Sterilizace žen po porodu nebyly v pořádku. <https://www.idnes.cz/zpravy/domaci/sterilizace-zen ... 21.12.2014>.
- MOTÝL, I. 2020: Po porodu je sterilizovali, protože jsou Romky. Na odškodné čekají desíty let. <https://cnn.prima.cz/po-porodu-je-sterilizovali...11.9.2020>.
- NEČAS, C. 1994: Českoslovenští Romové v letech 1938 – 1945. 1-a eld., Brno, Masarykova univerzita, 220 pağoj.
- NEČAS, C. 1995: Andr'oda taboris. Tragédie cikánských táborů v letech a v Hodoníně. 1-a eld., Brno, Masarykova univerzita, 163 pağoj.
- OLIVA, K. 2018: Slovo cikán není nekorektní. Jeho pravý význam nemůže nikoho urazit. **Chyba! Odkaz není platný.**
- PIVOŇ, R. 2009: Rituální nečistota – součást (nejenom) romské tradiční kultury. Pağoj 206-213. En: JAKOUBEK, M. & BUDILOVÁ, L. (Geeditoroj): Cikánské skupiny a jejich sociální organizace. 1-a eld., Brno, Centrum pro studium demokracie a kultury, 359 pağoj.
- RADOSTNÝ, L. 2013: Romská hudba (nejen) k tanci a poslechu. Pağoj 205-210. En: BITTNEROVÁ, D. & MORAVCOVÁ, M. (Ed-inoj): Etnické komunity. Romové. 1-a eld., Prago, Fakulta humanitárních studií Univerzity Karlovy, 223 pağoj.
- ROBERTS, J. M. 1999: Ilustrované dějiny světa II. Východní Asie a antické Řecko. 1-a eld., Prago, Knižní klub a Balios, 192 pağoj.
- SADÍLKOVÁ, H. 2021: Vinu za sterilizaci romských žen nenese jen komunistický režim. <https://a2alarm.cz/2021/04/hana-sadilkova-vinu...6.4.2021>.
- SADÍLKOVÁ, H., SLÁČKA, D. & ZÁVODSKÁ, M. 2018: Aby i s námi bylo počítáno. Společensko-politická angažovanost Romů a snahy o založení romské organizace v poválečném Československu. 1-a eld., Brno, Muzeum romské kultury, 230 pağoj.
- SEDOVÁ, S. 2020: V Mostě si rodiče stěžují na rozdělení prvních tříd podle barvy pleti. <https://www.novinky.cz/domaci/clanek/v-moste-si-rodice-stezuji... 3.9.2020>.

- SZUHAY, P. 2009: Sebedefinice romských etnických skupin a jejich vnímání jiných romských skupin. Paĝoj 169-176. En: JAKOUBEK, M. & BUDILOVÁ, L. (Geeditoroj): Cikánské skupiny a jejich sociální organizace. 1-a eld., Brno, Centrum pro studium demokracie a kultury, 359 paĝoj.
- WEINEROVÁ, R. 2013: Stereotypy v pojmenovávání Romů v České republice. Paĝoj 33-53. En: BITTNEROVÁ, D. & MORAVCOVÁ, M. (Ed-inoj): Etnické komunity. Romové. 1-a eld., Prago, Fakulta humanitárních studií Univerzity Karlovy, 223 paĝoj.

 En Hindio, 3 000 da jaroj a. K., Mohenjo-daro kaj Harappa estas ĉefaj centroj de civilizo apud la rivero Hinduso (<i>Indus</i>).	Unu el 2 000 da argilaj sigeloj (harapa kulturo). Ĝis nun neniu sukcesis tralegi antikvajn skribojn sur la sigeloj. 	 Antaŭularo de romaoj forlasis Hindion en multaj ondoj inter la 3-a – la 10-a jarcentoj p. K. Longtempe ili vagis en Persio kaj Armenio. Parto de nomadoj iris en nuntempan Ruslandon, pli malgrandaj grupoj sekvus marbordon de Norda Afriko, sed plej multe da romaoj iris en Greklandon.
Romaa proverbo  <i>Ŝun le phuren, bo ĥale buter maro sar tu! OBEU LA MALJUNULOJN, ĈAR ILI FORMANĜIS PLI MULTE DA PANO OL VI!</i>	Romaa proverbo <i>Ajsi romnji kampil, savi maro anel. BONA EDZINO KAPABLAS PRIZORGI LA PANON.</i> 	Romaa proverbo <i>Gaĝeske baŝavav andro kan, Romeske andro jilo. AL NEROMAO MI LUDAS POR LIA ĜOJO, SED AL ROMAO MI LUDAS POR LIA KORO.</i> 
El romaa kanto pri deviga laboro <i>Andr'oda taboris, joj phares butji keren, phares butji keren, joj mek mariben chuden.</i> En tiu barakaro, ho, laboro estas pena, laboro estas pena, ho, kaj ankaŭ batado. 1942 – 1943  Lety apud Pisek, Hodonin apud Kunišát.	 Brno, la 15-an de februaro 2018: Manifestacio al memoro de romaaj viktimoj de kampoj de deviga laboro en Lety apud Pisek kaj Hodonin apud Kunišát. D-rino Jana Horvátová parolas. Foto: O. A. Fischer	